

al la listo de konsiderotaj alternativoj ĉiun alternativon kiu venkas jam surlistigitan alternativon.

29. Daŭrigu ĉi tiun komparadon ĝis ĉiu el la originaj alternativoj estas aŭ metita en la liston de alternativoj por la aldona elekto, aŭ estas trovita ne preferata ol kiu ajn el la surlistigitaj alternativoj.

30. Kiam la listo de alternativoj por la aldona elekto estas preta, komparu ĉiun el ĉi tiuj alternativoj kun ĉiu el la ceteraj, kun kiu ĝi ankoraŭ ne estas komparita.

31. Deklaru tiun alternativon elektita, kiu estas preferata ol la plej granda nombro el la ceteraj.

32. Se pluraj alternativoj estas preferataj ol la sama plej granda nombro el la ceteraj, deklaru definitive eksigitaj ĉiujn aliajn, ne tiel ekvilibrantajn.

33. Inter la restantaj deklaru tiun elektita, kiu estas preferata ol la plej granda nombro el la ceteraj.

34. En okazo de nova ekvilibro, denove agu laŭ (32), k.t.p., ĝis fine restas unu alternativo, kiu do estas elektita, aŭ ĝis ĉiuj restantaj alternativoj troviĝas en ekvilibro.

35. En okazo de ekvilibro procedu jene: Se inter la alternativoj en ekvilibro A estas preferata ol B de a_{AB} , kaj B ol A de a_{BA} voĉdonintoj, A ol C de a_{AC} kaj C ol A de a_{CA} voĉdonintoj, k.t.p., tiam por la alternativo A notu $(a_{AB} - a_{BA}) + (a_{AC} - a_{CA}) + (a_{AD} - a_{DA}) + \dots$; simile por B: $(a_{BA} - a_{AB}) + (a_{BC} - a_{CB}) + (a_{BD} - a_{DB}) + \dots$; k.t.p.; kaj deklaru tiun alternativon elektita, kiu havas la plej grandan sumon.

36. Se pluraj alternativoj havas la saman plej grandan sumon, deklaru ĉiujn ceterajn alternativojn eksigitaj, kaj [denove komencu ĉe (31)]. Daŭrigu tiel, ĉu ĝis unu alternativo estas deklarita elektita, aŭ ĝis plua eksigo de alternativoj per aplikado de ĉi tiu metodo estas iĝinta neebla. En tiu ĉi lasta kazo] apliku regulon (24).

La reguloj (25) kaj (26) kontrolas la rezulton atingitan per la apliko de la reguloj (1) - (24) kaj eventuale konfirmas ĝin. Ĉi tiuj 26 reguloj kredible estas la plej taŭgaj por ĉiu sistemo akceptanta kaj kontentiganta la kriterion, ke oni elektu per ĝi tiun alternativon — se ĝi ekzistas — kiu ĉe duopa komparado venkas ĉiujn ceterajn.

Oni ja povas disputi pri ĉi tiu kriterio. Teorie, certe pli bonaj kriterioj eblas.

La supra sistemo ja ne kalkulas, ekzemple, kun la *intenso* de la preferoj. Sed kredeble, se oni klopodus kontentigi tiajn pli bonajn kriteriojn, tio kondukus al multe da falsado.

Ankaŭ la ĉi tie akceptita kriterio ne ekskludas gajnon per falsado. Tial la aldonaj reguloj (en la supra kazo la reguloj (27) - (36), kaj tute speciale (30) - (36)) estu tiaj, ke la ŝanco de gajno per falsado estu minimuma. Ŝajnas al mi ke la donitaj reguloj kontentige plenumas tiun kondiĉon. La elektorezulto laŭ la supra sistemo en ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj kazoj estas identa kun tiu al kiu kondukas la principo por kiu mi pledis en mia unua artikolo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna: „Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo”, Roterdamo 1952; 144 paĝoj, formato $20\frac{1}{2} \times 14\frac{1}{2}$ cm². Prezo: 10 anglaj ŝilingoj aŭ egalvaloro, aŭ 500 fr. fr., \$ 1.50, aŭ 5 ned. guld.

Eldono de la aŭtoro, Mendebla ĉe ĉiuj libroservoj aŭ ĉe F-ino Marianne Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70, Rotterdam, C. Nederlando.

Ĉi tiu nova verko de nia ŝatata samideano Lapenna certe ne havos efemeran vivon. Ĝi estas impona ankaŭ al Esperantistoj, kiuj povas admiri ĝian riĉan enhavon kaj vivan stilon, ankaŭ al neesperantistoj, kiuj ĉe supraja trafoliumo devas, kun aŭ sen miro, konstati, ke nia lingvo estas vere elasta kaj riĉa, se ĝi povas kontentigi la esprimbezonojn de universitata profesoro verkanta pri sia fako; li ja ne povus rezigni je la subtilaj klarigoj kaj distingoj bezonataj por la pritraktado de la elektitaj temoj. Se ĉi tiu libro estus nur propagandilo en la medioj de intelektuloj, ĝi jam havus unuarangan valoron.

Sed ĝi estas, kompreneble, multe pli. Kvankam ne elĉerpinta la temon, tiel vastan, anoncitan de sia titolo, ĝi enhavas tiom da valora materialo kaj tiom da pensiga instruo pri aferoj kiuj devus interesi ĉiun inteligentan personon vivantan en ĉi tiu jardeko. Ĉar vane ni legas en niaj gazetoj novaĵojn pri internaciaj aferoj, se ni ne povas loki ilin en la kadron kiu donas al ili signifon kaj ebligas al ni komprenon.

Ĉi tiu verko de Prof. Lapenna prezentas instruon ankaŭ por tiuj kiuj pensas, ke ili sufiĉe scias pri internaciaj aferoj. Jam la unua ĉapitro, kiu traktas pri la nocioj „ŝtato” kaj „nacio” prezentas al okcidenteŭropa leganto surprizajn aspektojn, kiujn oni en la orientaj landoj de Eŭropo pli klare rimarkas, pro la ekzisto de ŝtatoj kun plurnacia loĝantaro. Nejuristoj danke akiros taŭgan superrigardon kaj bonan instruon pri la fundamentaj nocioj pri la interŝtataj rilatoj kaj la internacia juro en lingvo kiu estas samtempe jure preciza kaj kompreneble klara.

La ĉapitro pri la federalisma principo estas verkita de iu, kiu konas ne nur la teorion, sed ankaŭ la praktikajn aspektojn de la problemo. Se ni aspiras al la federaciigo de Eŭropo, ni devus atenti la spertojn de la ekzistantaj federaciaj ŝtatoj kaj la problemojn kiujn la praktika vivo prezentas al ĝa respondecaj instancoj. „Por ke la federalisma principo bone funkcii en la praktiko, estas nepre necese liberigi la spiritojn de la homoj de tro mallarĝa naciisma aŭ eĉ provincisma konceptado kaj eduki ilin al pensado kaj sentado pli larĝa. Se oni ne povas atingi tion, la federalismo estas kondamnita je malsukceso, ĉar ĝi ne signifas superregadon de unu nacio, sed kunlaboradon de pluraj.”

Ke nia lingvo devus havi gravan taskon en la sukcesigo de federaciaj eksperimentoj, la aŭtoro ne forgesas mencii. Ĉi tiu admono estas valida por du partioj: por la organizontoj de federacioj, kiuj estus kapablaj, en sia serena mllopeco, malatenti la jam ekzistantan solvon de malfacila problemo, sed ankaŭ por ni, samideanoj, kiuj ne sufiĉe pensas pri tio, ke ni devus pli serioze

prepari nin por la tago de la venko, por ke ĝi ne surprizu nin en la nuna stato de bonvola diletanteco.

La dua parto de la verko de D-ro Lapenna traktas pri la lukto por la paco per juraj rimedoj. La aŭtoro priparolas la diversajn metodojn por solvado de internaciaj konfliktoj kaj dediĉas tutan ĉapitron al la Internacia Kortumo en Hago kaj al ĝia paciga rolo. Li klarigas la organizon kaj la funkciadon de ĉi tiu internacia institucio. Konsiderante, ke neniu ŝtato povas esti devigata aperi antaŭ la Kortumo kontraŭvole, la aŭtoro konkludas, ke la rolon de la Kortumo oni ne rajtas tro taksi (ankaŭ ne tro bagateli, pro aliaj konsideroj). La instrumenton de pacigo li nomas tamen „sufiĉe perfekta“, eĉ se nur el jura vidpunkto. Sed tiom longe kiom la jurisdikcio de la Kortumo ne estos deviga, ŝajnas al mi ke oni ne rajtas uzi la predikaton „perfekta“, eĉ ne kun la limigo „sufiĉe“, por ne paroli pri tio, ke la esprimo „sufiĉe perfekta“ estas en si mem dube-valora kaj ke tia instrumento estas, mi kredas, pli sufiĉa ol perfekta.

Tre interesaj estas la ĉapitroj pri „la internacia krimo“ kaj „la fundamentaj homaj rajtoj kaj ilia jura protekto“. Mi sentas la emon resumi ilin ĉi tie, sed pretere legu la originalan pritrakton. Vi certe ne bedaŭros, ke Prof. Lapenna diversloke cedas la lokon al Advokato Lapenna por pledi sian vidpunkton anstataŭ lekcii kun plena objektiveco. Vi rimarkos pli da krisignoj ol vi mem aŭ mi estus inklinaj presigi. Sed tio eble estas afero pli de gusto ol de ortografio kaj pri gustoj oni ne diskutu.

El ĉi tiuj ĉapitroj oni povas ĉerpi multe da instruoj kaj ne nur rilate al juro. Sed ankaŭ postrestas sento de melankolio kaj de ĉagreno, kiam oni legas, fine de esperiga paragrafo, ke „en multaj landoj la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, solene proklamitaj en deklarioj aŭ en konstitucioj, estis fakte piedpremataj de la ŝtata aparato“ kaj ke „ofte ili estis kaj estas nur bela ornamaĵo, utiligata grandskale por propagandaj celoj“.

Ĉar vane ĝojas kelkaj juristoj pri la surpapera kreo de kelkaj „modernaj“ liberecoj flanke de la „klasikaj“, se nek la unuaj, nek la duaj estas aplikataj en la praktiko. La Hagaj Konvencioj el la jaroj 1899 kaj 1907 „devigis“ la militantajn ŝtatojn respekti certajn „rajtojn“ de la civila loĝantaro, ekzemple. Ĉu ĉi tiuj ŝtatoj sentis sin devigitaj respekti tiujn rekonitajn rajtojn? Ĉu la civiluloj sentis, dum la sekvintaj militoj, ke li estas protektataj de la paragrafoj de la libervole subskribitaj konvencioj? Ĉu ili ne dependis de la bonvolo de la malamamikaj trupoj, kiuj kutime havas aliajn zorgojn kaj ne pensas pri obeado al la ordonoj de la hagaj „naivajoj“.

Ĉu oni ne rajtas esti skeptika — post la lastatempaj spertoj rilataj al la militkrimuloj el la dua mondmilito — pri la efikeco de la nove elpensita timigilo: krimo nomata *genocido* (direktita kontraŭ tutaj homgrupoj). Estas tre bele ekscii ke tiu ĉi plej nova krimo estas „krimo de internacia juro“ kaj ke, sekve, la internaj juraj ordoj devas konformiĝi al tiu ĉi stato. „Ili ne povas

permesi ion, kion la internacia juro malpermesas.“ Kaj se iuj landaj leĝoj tamen permesos — kaj eĉ postulos sendiskutan obeon? La juristoj-internaciistoj ne hezitas. „Se la jura ordo de iu ŝtato malharmonias kun la principoj aŭ reguloj de internacia juro, tiu interna jura sistemo estas kontraŭleĝa kaj la civitanoj rajtas malobei tiujn internajn jurajn ordonojn, kiuj kontraŭas al la internacia juro.“ Sed la viktimoj de la koncernaj paragrafoj ne estos la juristoj-internaciistoj, sed la simplaj civitanoj, kiuj, obeante al siaj superuloj, krimos kaj kiuj eĉ ne scios, ke ili havas la rajton kaj eĉ la devon malobei.

Kaj kian praktikan signifon havas la proklamo, ke en la interpretado de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj „nenio povas esti komprenita kiel donanta al iu ŝtato, grupo aŭ persono la rajton fari ion, kio detruus iun rajton aŭ liberecon, proklamitan en la Deklaracio“?

Notu, ke temas i.a. pri la libereco de cirkulado en sia propra lando kaj en eksterlando, pri malpermeso de arbitra enmiksiĝo en la privatajn aferojn, familion, hejmon aŭ ... korespondadon, aŭ ekzemple pri rajto al laboro, al socia asekuro kaj „al vivnivelo sufiĉa por certigi la bonfarton kaj sanon de la persono kaj de liaj familianoj“, rajto al senpaga edukiĝo elementa kaj al egala atingeblo de la supera edukiĝo ktp. Se iu ŝtato ne volos vidi en la Universala Deklaracio pli ol rekomendon (ĉar tio ĝi estas), kiel pruvi al ĝi, ke la rezonado de Prof. Lapenna sur la paĝoj 90-91 estas ĝusta? Ne forgesu, ke tiu ŝtato ankaŭ venigos juristojn (internaciistojn), kiuj malfermos la libron de s-ro Lapenna je la paĝo 89-a kaj atentigos i.a. ke „s-ino Roosevelt, la Prezidantino de la Komisiono deklaris, ke la projekto de la Deklaracio estas nek kontrakto, nek internacia akordo kaj ĝi ne havos ian ajn juran devigon“.

Malkuraĝiga aferstato, efektive, sed eble ne el jura vidpunkto. Tamen, la paĝoj 89-92 estas studindaj, kiel ekzemplo de jura logikumo. Nejuristo verŝajne sentos, ke ie okazis iu eta elreliĝo. Sed kie? Mi sugestas, ke en la mezo de la teksto, kie estas asertate, ke „la internacia juro rekonas la ekziston de la homaj rajtoj“, dum tute ne estas certe, ke la (de mi kursivigita) artikolo „la“ havas vivrajton en tiu loko. Ĉar la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj efektive rekonas, nerekte la ekziston de homaj rajtoj, sed ke ili estas precize tiuj, kiujn 3 jarojn poste voĉdonis iu komisiono — nek pli, nek malpli! — oni ne rajtas konsideri pruvita afero, precipe kiam estas sciata, ke okaze de la voĉdono 10 reprezentantoj sin detenis. Tiu „formala sindeteno“ certe ne signifis pretecon rekoni la juran devigecon de deklario, kiu jure havis, ankaŭ laŭ la opinio de la komisiona prezidantino, nur la valoron de rekomendo, kiom ajn ĝi tion, en sia koro, bedaŭris.

La tria parto de la priparolata verko ne estas la malplej interesa. Klare estas skizitaj la historiaj cirkonstancoj kondukintaj al la kunlaboro inter la malamikoj de la aksaj ŝtatoj kaj la ĉefaj etapoj en la formiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj. El jurteknika vidpunkto la Ĉarto de la U.N. bazita, ĉefe, sur la principo de kolektiva sekureco, estas, „multe pli perfekta“ ol la Pakto de la

Ligo de Nacioj; tiel instruas al ni Prof. Lapenna. Kaj tamen, multaj preferus la sferon de la iama Ligo, kie la delegitoj estis pli esperemaj rilate al la ebleco de la konservo de internacia paco kaj sekureco. La sennomaj milionoj de simplaj civitanoj el la tuta mondo fidis — eble iom naive — pli al la malpli perfekte organizita Ligo ol al la nuna organizo de „unuiĝintaj” nacioj, kie videble, aŭdeble kaj senteble du reciproke neamikaj grupoj de ŝtatoj senĉese pruvas, ke ili alian aferon komprenas per „kolektiva sekureco” kaj ke cetera la paco ne estas tiom nedividebla kiom oni pensis — aŭ ŝajnis — en 1944 kaj 1945. Post la ellaboro de tiuj belegaj, jurteknike perfektaj 111 artikoloj de la Ĉarto, certe neniu el la fakuloj imagis, ke estos eble diskutadi 8 plenajn monatojn pri la kondiĉoj de armistico (kaj ankoraŭ ne atingi ĝin), kiel tio nuntempe okazas en Koreujo. Ke la kulpo ne estos je la flanko de la Ĉarto, eĉ ne je la flanko de niaj simpatianoj, sed nepre flanke de „la aliaj”, tion estus povinta antaŭdiri ankaŭ junulo nesperta pri juro kaj pri politiko.

Kial mi, fakte, substrekas ĉi tiujn ombrajn aspektojn anstataŭ gaje min suni en la lumo de la famaj artikoloj? Ĉar kun ĉagreno mi devas konstati, ke la popoloj daŭre, kaj preskaŭ laŭplane perdas la sentojn de amikemo, kiuj ŝajnis, antaŭ malpli ol 10 jaroj, tiel ĝojigaj kaj esperigaj simptomoj de la estiĝanta nova solidareco interlanda. Kaj ĉar la kreado de fido kaj fidemo inter la popoloj ankaŭ estas aktuala problemo de nia nuntempa internacia vivo, tial mi kaptas la okazon de ĉi tiu diskuto por atentigi pri nia devo konsciiĝi pri ĝia ekzisto kaj agadi celkonscie por la proksimigo de la popoloj; ĉar nur reciproka kompreno povos savi nin kaj „niajn malamikojn” de nenececa kaj senutila buĉado.

El la ĉapitro pri la funkciado de la Unuiĝintaj Nacioj certe impresos kaj pensigos la klarigo kaj pravigo de la „principo de unuanimeco”. En niaj gazetoj ni regule legas mokajn aludojn al ĝi. Temas tiam pri la rajto de malpermeso („veto”) kiun havas la 5 grandaj potencoj kaj kies aplikon ridindigas, ne sen plezuro, multaj journalistoj. Ni komprenas, el la klarigoj de Prof. Lapenna, ke la ideo tute ne estas naiva aŭ mokiinda, sed realisma kaj estiminda, ĉar ĝi konsideras la faktajn rilatojn de la fortoj en la mondo, kiuj — en la lasta analizo — ja decidas pri la kondutlinioj de la grandpotencoj.

Konatiĝu, leganto, kun la konsisto kaj la funkcioj de la organoj de la U.N. kaj ankaŭ kun la aliaj interŝtataj organizaĵoj, el kiuj la specialigitaj institucioj, precipe la Internacia Organizaĵo de Laboro kaj UNESKO faradas speciale utilan kaj gravan laboron. Kaj ne forgesu lerni el la multa materialo entenata de la koncerna ĉapitro, ke nia Universala Esperanto-Asocio estas unu el la privataj kulturaj asocioj internaciaj, kun kiuj UNESKO oficiale kunlaboras.

La libro estas destinita por la vasta publiko, ne por fakuloj. Ĝi majstre instruas kaj instigas al pensado kaj kreas pli profundan intereson por la pri-traktitaj temoj. Ĝi ne estas romano unufoje legota kaj poste enŝrankigota.

Ĝi meritas esti aĉetata kaj ripete pristudata kaj sisteme dismontrata. Ĉiu pensema samideano aĉetu ĝin kaj ĉiu biblioteko de Esperantista grupo akiru ĝin.

Mi eĉ sugestus, ke la Esperantaj revuoj represu partojn de ĝi por diskonigi kelkajn plej trafajn paĝojn kaj por instigi al aĉeto kaj serioza studado. Necesos, kompreneble, akiri la tiucelan permeson de la aŭtoro, kiu posedas la repres-raĵon.

Mi ne forgesu menci, ke en „aldono” la aŭtoro prezentas internaci-juran studon pri „La signifo de la vortoj „Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj” en la art. 36/I de la Statuto de la Internacia Kortumo en Hago”. Ĝi estas destinita por la legantoj-juristoj kaj „tute aparte por la internaciistoj”. Dio scias, ke ili ankoraŭ ne estas multnombraj. Sed la valoro de ĉi tiu studo ne dependas de la nombro de internaciistoj ĝin legontaj. Ĝi estas, laŭ D-ro Lapenna, la unua pure faka studo pri speciala demando el la sfero de internacia juro, verkita en la Internacia Lingvo. Ĝi estu instigo al ĉiuj anoj de I.S.A.E. publikigi fakajn studojn en nia lingvo. Laikoj povos legi la studon por ĝui ekzemplon de jurista rezonado. Sed mi konsilas al ili, ke ili prenu bonan cigaron antaŭ ol komenci, por ke, se ili ne ĝuos la „aldonon”, ili almenaŭ ĝuu la cigaron.

La lingvo de la verko estas vivanta Esperanto. D-ro Lapenna estas majstra uzanto de la lingvaj eblecoj. Estas, tamen, interese, konstati, ke li, kiu kuraĝas uzi novajn formojn, ne ĉiam evitas nenecesajn malnovaĵojn; tio ŝajnas al mi pruvo, ke la lingvo, al kiu li alkitimiĝis, tiom regas lin, kiom li ĝin, kaj ke li, aŭtomate uzante ĝin, ne ĉiam rimarkas la eblojn de simpligo (ekz-e sur paĝo 81: „en kunligiteco kun” anstataŭ „en kunligo kun”). Aliloke mi notis la pezan vorton „malkunigo” anstataŭ „disigo” kaj mi vidis en ĝi nur pruvon pri rekta pensado en Esperanto kaj dumverkada kreo de la vorto; aŭ ĉu temas pri la instinkta zorgo de Esperanto-spertuloj uzi „facilajn vortojn” por esti komprenataj „de ĉiu”? La latindevenan „kaj — kaj” mi ne ŝatus vidi enkondukita en la ĝeneralan uzadon. Mi preferas: „ankaŭ — kaj ankaŭ” (paĝo 46: *Se kaj la federalaj unuoj kaj la federacio estas suverenaj ...*). Pri la uzitaj fakaj neologismoj mi diros malmulton: ili estas grandparte bezonataj kaj preskaŭ ĉiam taŭgaj. La „Konsilo de Sekureco” ne tre plaĉas al mi; mi klopodas eviti dusencajn vortojn. Sed kio estas la alternativo? D-ro Privat proponas „koncilo”. Mi preferus, ke ni restu ĉe nia „konsilantaro”. Cetera, kial ĝeni sin pri tiaj esprimoj? Ili sendube havas vivrajton en Esperantujo. Ĉu ili malpli taŭgas ... el propaganda vidpunkto? Tiun senton de malplivaloro ni devus lerni forskui: Esperanto devas plaĉi al tiuj kiuj komprenas ĝin, ne al la aliaj.

Pri la esprimoj: *ĉfu ajn, ĉiam ajn* ktp. mi ne povas konsenti, ĉar mi konsideras ilin pleonasmaj. Korektaj estas, laŭ mi, la *k-* formoj: *kiu ajn, kiam ajn* kaj, eventuale, la nedefinitaj formoj: *iu ajn* k.s.

Malpli, kaj nerevokeble, mi povas konsenti pri la uzado de la participaj formoj en la lingvo de Lapenna. Teorie ni ĉiuj scias kaj samopinias pri la diferenco inter *iu* kiu estas juĝata kaj *iu* kiu estas juĝita. Kial do ni hezitas,

